nia voĉo

madrida esperanto-liceo junio 2015

## VIZITOS NIN

En junio komenciĝas la tradicia periodo de turisma vizitado al nia urbo. Kaj tiu ĉi junio aspektas plenplena de vizitoj de amikoj, ĉefe el Francio.

Ĝuste komence de junio venos sinsekve vizitantoj el Bretonio. Dum kvar tagoj vizitos Madridon samideanino Fabienne, el Brest (Bretonio, Francio). La lundon 8an de junio ŝi partoprenos la kunvenon de MEL. Aliaj renkontoj eblas, kaj povas esti decidataj surloke.

Koincide, Fabianne foriros la saman tagon, la ĵaŭdon 11-an, kiam alvenos Ĵanik kaj Bert, kiuj restos ĝis dimanĉo 14a. Ili estas tre konataj aktivuloj diversfacete, interalie ĉe la Kulturdomo de Esperanto - Kastelo Greziljono.

Manolo Parra ekhavis ideon por pasigi belajn horojn kun Bert kaj Ĵanik: ekskursi la sabaton 13-an en la montaro. Jen la plano: oni marŝos de loko proksima al Cercedilla, nomata Las Dehesas, al la montpasejo Fuenfría kaj iom pli norden ĝis la restaĵoj Casarás; tie pikniki, ripozi kaj, posttagmeze, reveni. Tio postulas nur sportajn ŝuojn (tenis-tipaj sufiĉas) kaj iom da kutimo marŝadi. Oni rendevuos ĉe la trajnstacio de Cercedilla je la 10:20, koincide kun la alveno de trajno kiu startas el stacidomo Atocha je la 09:00. Poste per la aŭto(j) ĉiuj veturos ĝis Las Dehesas. Ĉiu kunportu sian piknikon, inkluzive akvon. Se vin altiras la propono, kontaktu kun Manolo aŭ skribu al nia adreso. Eblos rendevui kun niaj vizitantoj ankaŭ ĵaŭde aŭ vendrede.

Fine, alia vizitanto, Sylvie Plantier kun edzo kaj nepo alvenos la 15an kaj forflugos la 22an. Ni proponis al ŝi viziti la sidejon, alternative kafumi ie ajn, sed oni ankoraŭ ne havas definitivan planon. Estu atenta al la kutimaj retforumoj aŭ telefonu al la sidejo.

Por julio estis jam anoncita la vizito de Laurentina Parada, veterana esperantisto el insulo Granda Kanario. Ankaŭ aliaj samideanoj trairos nian urbon survoje al internaciaj kongresoj. Ni plu informos pri datoj kaj planoj.

## EN LA BANKO DE HISPANIO



Kiel anoncite, la pasintan 6an de majo nia 9-homa grupeto vizitis la centran sidejon de Banco de España. Tre zorge kontrolata estas la akcepto de vizitantoj, kio kaŭzas iom da tediĝo. Sed tuj zorgis pri ni sperta kaj profesieca gvidisto, kiu dediĉis al ni tri plenajn horojn. Li klarigis la funkciojn, intajn kaj nunajn de la institucio, priskribis la konstruaĵon (la plej valoran en Hispanio), montradis kaj klarigadis salonojn, koridorojn, imponajn ŝtuparojn, pentraĵojn, meblojn, vitralojn. Li detale priskribis ankaŭ la profundan kelon por gardi la or-provizon, sed tion ni ne povis vidi. Fine ĉiu ricevis mansakon kun kelkaj donacoj aludaj al la institucio. Plaĉa vizito, laŭ ĝenerala impreso.

## ESPERANTA LIBRO ĈE MADRIDA LIBROFOIRO

Vizitantoj de la madrida Feria del Libro (29 de majo ĝis 14 junio) povas aĉeti la verkon de Miguel Fernández "Memorindaj anarkiistoj kaj anarkiisma esperantismo" en la budo de Librería Malatesta (budo n-ro. 88).

## GRAVAJ KONGRESOJ EN VENONTAJ MONATOJ

La 100-a Universala Kongreso en Lillo, Francio, inter la 25 de julio kaj la 1 de aŭgusto 2015, sub la devizo "Lingvoj, artoj kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj".

Komence de junio jam estas aliĝintaj pli ol 2300 personoj el 81 landoj, inter kiuj ĉ. 50 el Hispanio. Ĉiuj informoj en http://www.lille2015.fr/ kaj http://uea.org/kongresoj/UK.

La 88-a SAT-kongreso okazos de la 8-a ĝis la 15-a de aŭgusto 2015 en Nitra (Slovakio), en la universitata studenthejmo “Bernolák”. Nitra estas bela kaj historia urbo, situanta nur 90 km de Bratislavo. En ĝi jam tri-foje okazis SES, kaj en la jaro 2016 la urbo gastigos la Universalan Kongreson. Pliaj informoj: http://www.satesperanto.org/-2015-Nitro-.html.

Profitante la viziton de Bert kaj Ĵanik, ni aparte anoncu ke la Kastelo Gresillon nin ĉiujn atendas en julio kaj aŭgusto. Tiu Kulturdomo de Esperanto situas en St. Martin d’Arcé, Baugé-en-Anjou, Francio, inter Angers, Tours kaj Le Mans. Plej gravaj estas la julia renkonto de familioj kun infanoj, kaj la organizataj antaŭ- kaj post-kongresoj al la UK. Vidu ĝian agendon/kalendaron en la retejo http://gresillon.org/agendo.

Somera Esperanto-Studado (SES 2015) okazos inter la 11-a kaj la 19-a de julio 2015, ĉi-foje en la urbo Martin, en Slovakio. Pliajn informojn ĉe http://ses.ikso.net/2015/

La 23-a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo okazos ĉijare inter la 3-a kaj la 10-a de oktobro en Roses (Ĝirono). Informojn kaj aliĝilojn eblas akiri skribante al la adresoj luis_serrano@ya.com kaj luis_serrano@mixmail.com.

Oni jam anoncis ke la 19-a Andaluzia Kongreso de Esperanto disvolviĝos de la 30-a de oktobro ĝis la 1-a de novembro 2015 en Jerez de la Frontera, pri la temo “Esperanto kaj Universitato”. Ni plu informos pri tiu ĉi promesplena evento.

## VIDEOJ DE LA HISPANA KONGRESO

Dum la lastaj tagoj estis alŝutitaj deko da filmetoj pri la lasta Hispana Kongreso de Esperanto okazinta en Cullera, inklude de resumo de la ĉefaj momentoj. Spektu ilin ĉe http://www.youtube.com/esesperanto.

## KUNVENOJ KAJ KONTAKTOJ

La kutimaj kunvenoj de MEL plu okazos ĉiulunde post la 18,30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13. Speciale atentu la ĉimonatajn antaŭanoncitajn vizitojn!

La sabata babilrondo okazos la 6-an de junio, je la 6-a, denove en la Parko de Retiro, apud la statuo al Ricardo Codorniu.

Por esti informitaj pri ĉiuj novaĵoj, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, aŭ la retan diskutejon pri ĝeneralaj esperantaj novaĵoj en Madrido http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/. En la socia reto Facebook, atentu du forumojn: tiun de MEL, ĉe https://facebook.com/esperanto.madrid, aŭ la pli ĝeneralan por ĉio okazanta en Madrido https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.

madrida esperanto-liceo
Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid
Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo
http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es
Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com